STELO. — *J. C. Wells* ........ 123
Statuto de ISAE ........ 125
Raporto pri la Referendumo pri la Statuto de ISAE ........ 128
Esperanto kaj la scienco en Nederlando. — *W. P. Roelofs* ........ 129
Aliaj informoj de la kongreso en Majenco ........ 129
Recenzoj kaj Bibliografio ........ 130
Sciencaj Studoj. — *W. P. R.* ........ 130
K. J. Moberg: Konstruteknika Terminaro. — *Francis E. Helmuth* 131
C. Pimentel: O Esperanto e a Terminologia Químico-Farmacêutica. — *W. P. R.* ........ 131
Tähtitaivas ........ 132
Ingegneria Meccanica. — *W. P. R.* ........ 132
Raportoj de Ŝtata Gardeneksperimentejo de Alnarp, Svedio ... 133
*Ivo Lapenna:* Retoriko (dua eldono). — *W. P. R.* ........ 134
*G. Waringhien:* Grand Dictionnaire Espéranto-Français. — *W. P. R.* ........ 135
Belarto. — *W. P. R.* ........ 136
*Joseph von Eichendorff:* El la vivo de netaŭgulo. (trad.: P. Benneman) — *G. F. M.* ........ 137
*Sándor Szathmári:* Vojaĝo en Kazohinio. — *W. P. R.* ........ 138
*Marjorie Boulton:* Cent Ĝojkantoj. — *W. P. R.* ........ 143
*Ferenc Szilágyi:* Tiel okazis — aŭ Mistero minora. — *W. P. R.* 143
*Machado de Assis:* Teatro (4 komedioj tradukitaj). — *W. P. R.* ... 144
La Verda Vojo. — *W. P. R.* ........ 144

34

## LA UNIVERSALA DEKLARACIO PRI LA HOMAJ RAJTOJ DEKJARA

Post kelkjara preparo la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj estis akceptata la 10-an de decembro 1948 far la Generala Kunveno de la Unuiĝintaj Nacioj; 48 voĉdonis por, neniu kontraŭ, 8 sin detenis de voĉdono, kaj 2 forestis. En la sama sesio oni ankaŭ akceptis la Konvencion pri Genocido, kiun poste la pli multaj nacioj ratifis.

Jen kelkaj pliaj paŝoj de la homaro sur la vojo al homeco. Kaj tial oni festas ĉi-jare la dekan datrevenon de la naskiĝo de ĉi tiu deklaracio. Ĉi tiu deklaracio stariĝas normon — provizoran, sendube, ĉar, kiel ŝajnas al mi, unuparte ĝi donas tro malmulte, kaj aliparte tro multe, ekz. en siaj paragrafoj 23, 24, 25 kaj 26 — normon, tamen, kun kiu la efektiva praktiko multloke mizere kontrastas, normon, kiu kredeble nenie estas plene atingata. Kaj ne sufiĉas festi paperan deklaracion, sed necesas lukti por tio, ke la realo konformiĝu al ĝi. Se en mez-amerikaj ŝtatoj la veraj regantoj estas usonaj fruktkompanioj kaj usona perforto forigas demokrate elektitajn registarojn, tio evidente ne estas konforma al la Deklaracio. Se en la Proksima Oriento Usono kaj Britujo subtenas la reakciulajn reĝojn kaj ŝejkojn en kies poŝojn fluas la avantaĝoj de la



ekspluatado de la tiea petrolo, dum la popolo daŭre suferas en nigra mizero, tio evidente ne estas konforma al la Deklaracio. Se la loĝantaro de Formoso ne havas la eblon libere elekti ĉu ĝi apartenos al la Ĉinujo de Maŭ-ce-tung, aŭ ne, sed se fakte Usono decidas ke ne, tio ankaŭ ne estas konforma al la Deklaracio. Politikaj elektoj en komunismaj landoj certe ne estas konformaj al la Deklaracio. En multaj el ili la reĝimo tuj falus, se la popolo havus nur ŝancon faligi ĝin. Kaj tute tiel same ekz. en Hispanujo kaj Portugalujo, kiujn oni ĉi-flanke de la fera kurteno bonvolas rigardi kiel apartenantajn al la „libera mondo". Nek estas konforme al la Deklaracio la forpelo de ĉiuj loĝantoj el regionoj kie oni intencas eksperimenti per atombomboj, nek, cetere, la venenigo per tiaj eksperimentoj de la fontoj de nutraĵo en vastega ĉirkaŭaĵo, eĉ en la tuta mondo, sed tute speciale en kaj ĉirkaŭ Japanujo. Ne konformas al la Deklaracio ĉiaj diskriminacioj kontraŭ rasoj, gentoj, ideologioj, ktp., kiaj ankoraŭ ĉiutage okazadas ĉie en la mondo. Rilate rasan diskriminacion sufiĉas pensi pri Sud-Afriko kun sia hipokrita kristaneco. Plej aĉa moko de la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj kaj la konvencio pri Genocido estas la terura genocido kiun jam de jaroj la francoj praktikas en Alĝerio, kaj kies priskriboj ŝajnas nekredeblaj kaj tamen ne povas esti neataj. Cetere alia nepre forigenda diskriminacio estas tiu rilate al homoj sen ŝtataneco aŭ sen „paperoj", kiuj ofte estas sendataj de unu lando al alia kiel nedezirataj fremduloj. Ankoraŭ la Deklaracio ne proklamas la rajton de ĉiu homo vivi kaj loĝi kie ajn en la mondo plaĉas al li. Ankoraŭ ĝi ne deklaras ke li havas pri tiu mondo rajton precize egalan al tiu de kiu ajn alia mondcivitano. Ankoraŭ ĝi ne deklaras ke ĉiu havas rajton pri la plena produkto de sia laboro kaj ke la vojo estu libera al la iom-post-ioma realigo de tiu rajto. Tamen, paragrafo 17 deklaras 1. ke ĉiu rajtas havi proprietaĵon, ĉu individue, ĉu asocie kun aliaj, kaj 2. ke neniu estu arbitre senigata de sia proprietaĵo. El tio oni rajtas konkludi, ke kaj inflacioj kaj deflacioj estas kondamnitaj, ĉar inflacioj prirabas la kreditorojn, kaj speciale aĉe tiujn kiuj vivas per fiksitaj enspezoj, unuavice la pensiulojn, kaj deflacioj prirabas la ŝuldantojn, ne nur per tio ke ilia ŝuldo reale pligrandiĝas, sed ĉefe pro tio ke la malbona konjunkturo kiu ĉiam akompanas deflacion, kaŭzas al ili la plenan perdon de sia havaĵo. Dume ni devas konstati, ke ankoraŭ nenie oni faris ion por ke la mono estonte estu konstantvalora.

Do, festante la dekan de decembro, ni ne forgesu kiom senfine multe estas ankoraŭ farenda!

W. P. R.